

Astronomia Esperanto-Klubo

Fine de la 20a jarcento ni havas tre rapidan komunikilon, per kiu eblas agi ankaŭ Esperante. Temas pri Interreto. Rapide, danke al tiu rimedo, trovinte samideanojn, sukcesis komence de tiu ĉi jaro krei grupon de homoj, kiuj ne nur parolas kiel komunan lingvon Esperanton, sed ankaŭ havas komunan intereson pri astronomio kaj astrofiziko. Tiel aperis unue tute virtuale (en Interreto) "Astronomia Esperanto-Klubo (AEK)". Interreto donas al ĉiu ano de la klubo eblecon rapide komunikiĝi (preskaŭ senpage!).

Jam antaŭ la tiuĉijara Universala Kongreso en Tel-Avivo venis al mi la ideo, kolekti dum la kongreso esperantistojn interesiĝantojn pri astronomio kaj astrofiziko. Fine de la 70aj jaroj estis eldonata tre interesa revuo "Homo kaj Kosmo", kiun mi tre ŝatis legi. Esplorante la nunan situacion en la Esperanto-movado evidentiĝis, ke ne ekzistas iu faka grupo pri tiu temo*. Do, jen la bazo de nia laboro.

Nun nia klubo havas 72 membrojn en pli ol 20 landoj, kaj sian organizan kunvenon AEK havis dum tiu ĉi UK en Israelo. Aliĝis ankaŭ pluraj esperantistoj sen ebleco uzi Interreton. Tial estis decidite, regule eldoni paperan varianton de la klubo bulteno: kutime ĉiu klubano ĉiun duan semajnon ricevas rete nian bultenon.

Unue estis konstruita klubo TTT-paĝaro, kiu antaŭnelonge transiris al fina adreso (<http://www.esperanto.org/AEK>), kaj la paĝaron povas viziti iu ajn de ie ajn sur la terglobo. Tiu TTTejo nomiĝas "nia klubejo" kaj ĝi enhavas informojn pere de kontribuoj, kiujn sendas klubanoj. Ankaŭ artikolojn, kiuj jam aperis en Interreto, atingebles de la klubejo. Uzante tiun ĉi pan komunikeblecon ni povas nei kluban kotizon, t.e. ĉiu kiu deziras membriĝi devas simple plenigi mallongan enketilon troveblan en la klubejo aŭ simple sendi retmesaĝon. Plua diferenco rilate al aliaj kluboj estas nia plena demokratieco en klubo vivo. Ni havas nek prezidanton, nek sekretarion, ĉar por ni ne gravas postenoj, sed laboro.

Tuj post la fondiĝo, grupo de aktivaj klubaj membroj komencis labori pri "Astronomia Terminaro". Tute nature, ke ankaŭ tiu Terminaro aperas en Interreto (vd. <http://www.Esperanto/AEK/AT>). Ĝi baziĝas sur jam aprobitaj terminoj, kiuj antaŭ multaj jaroj estis publikigitaj en PIV kaj en diversaj Esperanto-revuoj (ekz. "Scienca Revuo" aŭ "Homo kaj Kosmo"). Ili aperos ankaŭ en la nova eldono de PIV. La laborgrupo ordigis tiujn terminojn kaj daŭre riĉigas la liston per novaj vortoj, pridiskutante ilin en publika "virtuala" diskutgrupo (<http://www.egroups.com/group/acko>). La grupo ĉiam ĝojas pri novaj kunlaborantoj. Interesatoj skribu al *H.Rocha-Pinto* (cisdur@yahoo.com). Interalie, kreskas ne nur vortprovizo de la terminoj,

* (redakta noto: sed ekzistis Astronomia Sekcio de ISAE, kiu eldonis la supre menciitan periodaĵon "Homo kaj Kosmo")

sed tradukoj en diversajn lingvojn (inter ili portugala, angla, germana, ĉeĥa, rusa, turka, pola, japana, hebrea k.a.). La unua publika sinprezentado de la AT estas dum Kolokvo pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tehniko (KAEST) kiu okazas ĉiun duan jaron en Prago, Ĉeĥio.

AEK ne nur okupiĝas pri fakaj terminoj, sed, uzante ilin, tradukas diversajn artikolojn (ekz. popularan astronomian TTT-paĝaron "Naŭ Planedoj"), aŭ mem skribas ilin. La plimulto de niaj membroj estas amatoroj (sed ankaŭ profesiuloj troviĝas en la klubo) kaj pro tio ĉefe popularaj artikoloj estas verkataj. Jam aperis "Astronomia Almanako 2000", kiu krom divers-tema astronomia artikolaro enhavas astronomian kalendaron por observemuloj (aĉetebla ĉe Libroservo de UEA). AEK komencas nun prepari la sekvan Almanakon por la jaro 2001.

Unu el la ĉefaj taskoj de la klubo estas edukado pri astronomio kaj per novajn sciencajn sciojn al vasta publiko. Uzante ĉi-someran staĝon en Esperanto-Centro "Kvinpetalo" (Francio), AEK planas ekde la venonta jaro regule mem organizi tiajn staĝojn.

La unua tiuspeca AEK-staĝo okazos ekde la 8a ĝia la 15a de septembro 2001 en la suda parto de Alpoj en Observatorio de Monto *Chirán*, Francio. La programo estos tre varia, sed speciale dediĉita al la t.n. "variaj steloj". La staĝon gvidos sperta astronomo kaj denaska esperantisto, *Patrick Lagrange*. Detalaj informoj estas haveblaj de la aŭtoro de tiu ĉi kontribuo.

Konkreta uzado de Esperanto por diversaj sciencaj projektoj jam ne estas estonteco, sed realeco de la klubo agado. Kiam okazis tre aktiva meteorpluvo de Leonidoj (meteoroj kiuj fontas el konstelacio de Leono), astronomoj specialigantaj pri tiu fako ĉiam petas helpon de amatoroj en observado. Unu el la plej konataj internaciaj organizoj kiuj gvidas la observadon estas Internacia Meteora Organizo (IMO). Ĉi-jare helpante al IMO, AEK lanĉis projekton "AEK observas Leonidojn", kies rezultoj estis senditaj al IMO. Tiu vaste konata organizo laŭdis la klubon pro la laboro. Estis decidite, ke la kunlaboro daŭros. La projekton partoprenis klubanoj el Usono, Hispanio, Francio, Israelo.

En tiu komenca jaro de nia ekzisto kiel AEK ni faris multon. Planoj por venontaj jaroj jam abundas. Sen helpo de aktivuloj la laboro tamen ne estus efektiviĝinta. Inter ili menciindas: klubo kunfondanto d-ro *Helio Rocha-Pinto* (Brazilo), *Lars Sözüer* (Germanio), *Johano Rapley*, *Patrick Lagrange*, *Hana* kaj *Witold Cayzac* (ĉiuj Francio), prof. *Amri Wandel* (Israelo), d-ro *David Galadí-Enriquez*, *Antonio Sanchez*, *Marco Trevisan* (ĉiuj Hispanio) kaj multaj aliaj. Ni ĝojas pri novaj membroj.

Klaran ĉielon al ĉiuj ISAE-anoj kore deziras Astronomia Esperanto-Klubo.

Alexander Mikishev <mikisal@inverness.co.il>, kunordiganto de AEK